# LA REGULARO

*Ĉi tiun eldonon de la kluba regularo, aprobis speciala aferkunsido la 31-an de marto 2023.*

## 1. NOMO

La nomo de la klubo estu "La Londona Esperanto-Klubo" (anglalingve "The London Esperanto Club").

## 2. CELOJ

La celoj de la klubo estu:

2.1 progresigi la studadon kaj disvastigon de la internacia lingvo Esperanto.
2.2 okazigi kursojn pri Esperanto.
2.3 aranĝi kunvenojn por esperantistoj.
2.4 akcepti kontaktojn de esperantistoj el aliaj regionoj kaj landoj.

## 3. NEŬTRALECO

Inter gentoj, nacioj, etnoj, religioj, politikaj partioj, genroj, seksecoj kaj seksemoj la klubo estu neŭtrala. Tamen ĉi tiu regulo ne malpermesu la okazigon de parolado aŭ diskuto pri tiaj temoj.

## 4. LINGVO

La funkcia lingvo por ĉiuj kunvenoj kaj dokumentoj estu Esperanto. Ĉi tiu regulo tamen ne malpermesu la uzon, pro bezono aparta, de alia lingvo.

## 5. MEMBRECO

5.1 La klubo havu honorajn membrojn kaj ordinarajn membrojn.
5.2 Por fariĝi membro ordinara oni deklaru sian akcepton de la kluba regularo, eventuale pagu kotizon laŭ regulo 6.3, kaj ricevu aprobon de la komitato.
5.3 Por fariĝi membro honora oni akceptu inviton de la komitato, krom Honoraj Oficuloj kiuj estas elektitaj de membrara aferkunsido.
5.4 La devoj kaj rajtoj de membreco por ĉiuj klubanoj estu samaj, krom pago aŭ nepago de kotizo.

## 6. KOTIZOJ

6.1 Honora membro ne devu pagi kotizon.
6.2 La komitato rekomendu, kaj membrara aferkunsido decidu, kotiztarifon kaj pagsistemon por aliaj membroj, eventuale en kategorioj diversaj.
6.3 Kotizoj estu pagendaj je membriĝo, kaj sekve ĉiujare laŭ la pagsistemo aprobita dum membrara aferkunsido.

**7. JARKUNSIDO**

7.1 Membrara jarkunsido okazu ĉiujare antaŭ la fino de marto.

7.2 Membroj ricevu antaŭ-anoncon, minimume dek kvar tagojn antaŭe.

7.3 En la tagordo estu:

7.3.1 protokolo de la lasta jarkunsido kaj aliaj membraraj aferkunsidoj poste okazintaj.

7.3.2 raporto pri la lasta jaro.

7.3.3 jarfina bilanco kaj speza konto.

7.3.4 elekto al honoraj oficoj kaj al la kernaj funkciaj oficoj laŭ regulo 8.2.1

7.3.5 decido pri kotiz-tarifo kaj pagsistemo por la jaro tuj sekvonta.

7.3.6 elekto de komitatanoj kaj kont-kontrolistoj.

7.3.7 aliaj aferoj.

**8. OFICOJ**

8.1 **Honoraj oficoj**

La klubo rajtu havi patronojn, honoran prezidanton kaj honorajn vicprezidantojn, kiuj ne estu, pro tiaj oficoj, membroj de la komitato.

8.2 **Funkciaj oficoj**

8.2.1 Kernaj oficoj en la klubo estu tiuj de prezidanto, vicprezidantoj (maksimume du), sekretario, kasisto, kaj registristo.

8.2.2 Aliaj oficoj estu eventuale starigitaj de la komitato.

8.2.3 Kandidato por funkcia ofico estu membro de la klubo, krom ke kont-kontrolisto ne nepre estu membro.

8.2.4 Kiam okazas, aŭ pro manko de kandidato aŭ pro demisio de oficulo, ke ofico restas aŭ fariĝas vaka, oficulo rajtu akcepti, kaj provizore plenumi, du oficojn.

8.2.5 Ekzistu oficoj de ĉefa kaj helpa kont-kontrolistoj. Membro de la komitato ne rajtu esti kandidato por tiuj oficoj.

**9. KOMITATO**

9.1 **Konsisto**

La komitato konsistu el klubanoj elektitaj al kernaj funkciaj oficoj, kaj aliaj membroj elektitaj dum la jarkunsido. La maksimuma nombro da komitatanoj estu dek.

9.2 **Devoj**

La komitato havu la devojn:

9.2.1 kunsidi laŭbezone.

9.2.2 administri la aferojn de la klubo laŭ ĉi tiu regularo.

9.2.3 ĉiujare prezenti al la jarkunsido jarfinan bilancon, spezan konton kaj raporton pri la laboro de la lasta kalendara jaro, kaj proponon por kotiztarifo kaj pagsistemo.

9.2.4 dum la unua komitata kunsido post la elektiĝo de la komitato, nuligi per elekto(j) eventualan mankon (laŭ regulo 10.1) de kern-subkomitatanoj. Kandidatoj estu komitatanoj.

9.2.5 aprobi aŭ malaprobi petojn por membriĝo.

9.2.6 eventuale kunvenigi membraran aferkunsidon de la klubo laŭ regulo 12.1

9.2.7 administri dokumenton kio listigas la daŭrajn decidojn pri la konduto de la komitato.

**9.3 Rajtoj**
La komitato havu la rajtojn:

9.3.1 plenigi vakajn oficojn.
9.3.2 starigi subkomitatojn kaj kromajn oficojn kaj elekti al ili membrojn, kiuj ne estu pro tia elekto membroj de la komitato.
9.3.3 starigi regulojn por la funkciado de subkomitatoj, inkluzive de la kerna subkomitato.
9.3.4 elekti honorajn membrojn.
9.3.5 eksigi membron aŭ honoran membron, sed necesu jese voĉdonanta plimulto de la tuta komitato, kaj la koncerna persono havu rajton pledi al la komitato kontraŭ la eksiga propono.
9.3.6 rekomendi kandidatojn por la honoraj oficoj al la konsidero de la jarkunsido.
9.3.7 kunvenigi membraran aferkunsidon de la klubo laŭ regulo 12.1.2
9.3.8 Ĉiu membro havu nur unu voĉon, ĉu aŭ ne tiu tenas du oficojn.

## 10. KERNA SUBKOMITATO

10.1 **Konsisto**

10.1.1 La kerna subkomitato havu ses membrojn.
10.1.2 Ĉiu kerna oficulo estu membro de la kerna subkomitato.
10.1.3 Se la kerna subkomitato ial havus malpli ol ses membrojn, la komitato elektu el inter si, laŭ devo 9.2.4, sufiĉan nombron da kromaj subkomitatanoj. Ties membreco daŭru nur ĝis sekvonta jarkunsido.

10.2 **Devoj,**
La kerna subkomitato havu la devojn:

10.2.1 trakti urĝajn aferojn, kiuj bezonas decidon antaŭ ol estas eble kunvenigi la tutan komitaton.
10.2.2 raporti pri siaj agoj al la sekvanta komitata kunsido.
10.2.3 konsulti laŭeble aliajn komitatanojn pri gravaj decidoj.

## 11. DAŬRO DE ELEKTITECO

11.1 Elekto farita de membrara aferkunsido restu valida ĝis la sekvonta jarkunsido aŭ ĝis pli frua speciala membrara aferkunsido tiucela.
11.2 Elekto farita de la komitato laŭ regulo 9.3.1, 9.3.2 aŭ 9.3.4 restu valida ĝis ties kontraŭa decido.

## 12. SPECIALA MEMBRARA AFERKUNSIDO

12.1 Speciala membrara aferkunsido okazu pro …

12.1.1 aŭ ricevo de tiucela peto al la komitato, subskribita de almenaŭ 25 membroj,
12.1.2 aŭ decido de la komitato.

12.2 La kunsido okazu ne pli ol dudek unu tagojn post ricevo de la peto.
12.3 La klubanoj ricevu antaŭ-anoncon pri la kunsido minimume sep tagojn antaŭe.
12.4 La peto kaj la antaŭ-anonco precize difinu la proponata(j)n  rezolucio(j)n.

**13. KVORUMOJ**

13.1 Kvorumo ĉe membrara aferkunsido estu okono de la membro-nombro en la lasta aprobita jarraporto, kun minimumo de sep, aŭ duono de la membronombro plus unu, se malpli ol 14.

13.2 Kvorumo ĉe komitata kunsido estu kvin.

13.3 Kvorumo ĉe kunsido de subkomitato estu duono de ĝia membraro.

13.4 Se kalkulita kvorumo ne estas entjera, oni ignoru la parton frakcian.

13.5 Se la kerna subkomitato frontas decidon neprokrasteblan, decidu tiu(j), kiu(j) ĉeestas, konsulte kun ĉiuj aliaj atingeblaj.

**14. REGULARO.**

14.1 Ĉiu membro ricevu unu ekzempleron de la regularo senpage.

14.2 Por fari ŝanĝon en la regularo estu necesa du-triona plimulto de partoprenantoj en jarkunsido aŭ en speciala membrara aferkunsido okazigita tiucele.

**15. LIKVIDO**

15.1 Por aprobi likvidon de la klubo estu necesa du-triona plimulto de partoprenantoj en speciala membrara aferkunsido aŭ, se ne eblas tion aranĝi, skriba aprobo de pli ol duono de la tiama membraro.

15.2 En okazo de likvido de la klubo pro ia ajn kialo, la bonhavo estu transdonata al la nacia Esperanto-asocio, krom partoj havantaj limigojn, kiuj tion malpermesas.

15.3 Bonhavon kun limigoj oni disdonu kongrue kun tiuj limigoj.

Fino de la Regularo